



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 279

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au fonds normand de la Médiathèque de Caen
et à la bibliothèque de Cherbourg.

Januaro 2021

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



L'année prochaine sera moins galère.
Parole de Normands !!!



Avec leur autorisation, empruntons à Heula :

L'année prochaine sera moins galère. Parole de Normands !!!

Vivu 2021 !

***Al vi ĉiuj, ni deziras senmaskan,
senizoligan kaj bonfartan Novjaron !
Kun la espero vin baldaŭ renkonti
dum novaj kaj fruktodonaj E-o
rendevuoj en Normandio !***



NIA TURISMA TAGO EN FALAISE

Post la nuligo de la Ĝenerala Asembleo en Avranches, antaŭvidita por majo, ni multe hezitis pri la turisma tago en Falaise ĉar la registaro kaj la gazetaro jam aludis pri dua izoligo. Ĉar pluraj normandanoj esprimis sian deziron partopreni tiun tradician rendevuon por kunveni kun amikoj kaj elkovri novajn vidindaĵojn, ni finfine decidis konfirmi la turisman tagon en Falaise.

Kaj ni pravis ! 23 homoj venis de la kvin departementoj por ĝui belajn vizitojn pri kiuj kelkaj raportas en tiu bulteno. La bongusta tagmanĝo en la restoracio « Les Remparts » videble kontentigis ĉiujn kaj la viglaj kaj amikaj konversacioj, sen maskoj sed kun respekto de la sanaj reguloj, konfirmis, ke tiaj aranĝoj meritas la penon !

Barthélémy Maurau jam pripensas novan Turisman Tagon en kaj apud Evreux. Jen bela rendevuo por oktobro 2021 !

Yves Nicolas



ENHAVO

- P. 1 2020 la galère ! Vivu 2021 ! La vorto de la redaktoro pri Falaise.
P. 2 Enhavo, liste des adhérents à jour pour l' année 2020, décès de Odile Bony.
P. 3 Des nouvelles du C.A.
P. 4, 5, 6,7
Dosiero
Bela turismado en Falaise ! Jen la raportoj.
P. 7 Staĝo en Grezilhono, le Gvidilo nouveau est arrivé.
P. 8 Kongreso, zoom, maskoj.
P. 9 La normanda dialekto.
P. 10 La rue Zamenof à Sotteville-Les-Rouen.
P. 11 Vidpunkto : anarkiismo kaj esperanto
P. 12 C' est bien joli d' apprendre l' espéranto mais pour quoi faire ?

En tio bulteno, fotoj de Anne-Marie, Véronique, Yves, Pierre, Bertrand et Michèle.

Liste des adhérents à jour pour l'année 2020.

Nous constatons une diminution d'adhésion en partie due à l'annulation de notre Assemblée Générale d'Avranches pour cause de confinement. En effet, plusieurs de nos adhérents ont pris comme habitude de régler leur cotisation à l'occasion de cette réunion annuelle. Hélas, plusieurs ont oublié par la suite de confier leur chèque aux services de la Poste. Pour la bonne gestion de notre association, optez plutôt en 2021 pour un envoi de votre contribution dès le mois de janvier à notre amie et trésorière Sylvie Caron ! Vos 10 € ? I-N-D-I-S-P-E-N-S-A-B-L-E-S !!!

Olga BELIAVA (Russie), Véronique BESSIN (50), Philippe et Odile BONY (50), Sylvie CARON (76), Alain CHALM (76), Véronique CHARLES (14), Dominique CORNICE (14), Brigitte COTTIN (14), Jean-Pierre DANVY (50), Cora DION (14), André Dubois(14) Patrice DUFEU (76), Bernard DUFRESNE (76), Evelyne DUVAL (76), Patrick ETIENNE (50), Gisèle EHRENFELD (17), Marie-Claire EVARISTE (50), Claude FERRAND (14), Francine et Jean-Marie FORTIN (14), Véronique GIRARD (14), Jean GONTIER (50), Ginette GUEROULT (76), Robert GUILMOT (76), Pascal HEBERT (61), Lucienne HERPIN (50), Madeleine HUBERT (14), Jean-Pierre JAMES (50), Nicole JEHENNE-LEDRAU (14), Michèle LANGEAIS (14), Maurice LARDEUR (14), Rémy LEBRUN (27), Auguste LECARRIE (50), Matthieu LECESNE (76), Maryse et Pierre LEMARCHAND (76), Marcel LEMELTIER (50), Anne-Marie LEPREVOST (61) Dominique LEROY (76), Christian LEVESQUE (50), Denise LOISEL (83), Françoise MARIE (14), Aline MARTIN (14), Barthélémy MAURAU (27), Elisabeth MEREL (50), Annick MULOT (50), Yves NICOLAS (14), Yolande PARIS (27), Michelle PAUMIER (14), Marie-Anne PIETTE (14), Jocelyne PITEL (50), Marie-Thérèse et Petro QUILLAUD (34), Pierre ROBIOLLE (50), Mireille ROSSELIN (50), Henri ROUSSEAU (14), Jeanine ROUSSEAU (60), Jean-Pierre SAUVAGE (14), Jeanne SCHERTZER (50), Gigi et Gérard SENECAU (14), Bertrand VERSTRAETE (14).

Décès d'Odile Bony

Odile a succombé à une longue maladie à la fin de cet été. Avec Philippe, Odile a participé à plusieurs de nos rencontres régionales de ces dernières années. Stage et AG à Hérouville ou, plus récemment, pendant la belle visite touristique de Granville.

Enseignante d'anglais au lycée privé de Coutances, où Philippe enseignait également, Odile était très attachée aux valeurs de la langue internationale. C'était un plaisir d'engager la conversation avec elle et, entre autre, d'évoquer ses activités cyclistes et sportives.

Nous adressons toute notre amitié à Philippe et espérons le voir bientôt à nouveau parmi nous.



Autour de la table : Sylvie, Yves, Anne-Marie, Jean-Pierre, Christian, Barthélémy, Michel et Patrice.

Merci à toi, Véronique, et à très bientôt !

Chère Véronique,
Nous étions très heureux de te voir prendre la présidence de notre association, lors de notre Assemblée Générale d'Equemauville, en 2019. Nous connaissions ton engagement par ailleurs dans le mouvement espérantiste. Nous apprécions également ton enthousiasme et ton envie de nous faire partager les belles rencontres internationales auxquelles tu participais. Enfin, une présidence féminine, pour la première fois, n'était pas pour nous déplaire !
Cependant, de nouvelles responsabilités d'ordre personnel, se sont bientôt imposées à toi, te rendant totalement indisponible pour mener à bien la présidence d'une association, fut-elle si modeste que la nôtre.
Nous le comprenons et nous t'assurons de notre amitié. Et puis, nous gardons espoir de te revoir bientôt parmi nous pour de nouvelles aventures sous la petite étoile verte !

Le Conseil d'Administration.

Compte-rendu C.A du 3 octobre à Falaise

La séance s'est tenue lors du repas au restaurant « Les Remparts » où une table avait été réservée pour les membres du Conseil d'Administration.

Etaient Présents : 14 Yves Nicolas, Jean-Pierre Sauvage, 27 Barthélémy Maurau, 50 Christian Lévesque, 61 Anne Marie Leprévost, 76 Sylvie Caron, Patrice Dufeu.

Changement de président : Véronique Girard nous a informés que, pour des raisons personnelles, elle ne pourra plus assurer la présidence de notre association. Durant le repas, Jean-Pierre Sauvage (Caen) veut bien assurer cette responsabilité. Sa proposition est retenue à l'unanimité.

La prochaine Assemblée Générale (à Avranches ?) : après le report du projet de mai 2020 (CoViD 19), le groupe local avait accepté que le report soit fait en mai 2021. Le groupe local doit être recontacté pour confirmation. Christian propose comme invité étranger, le conférencier allemand qu'il a déjà rencontré : Rainer Kurz, spécialiste de l'accueil des migrants. Le contacter pour un accord de principe.

Visite Touristique d'octobre 2021 : Barthélémy Maurau renouvelle sa proposition : en matinée, visite d'Evreux, puis après-midi Conches. Elle aurait lieu un samedi du début d'octobre 2021. Barthélémy explore les possibilités et le CA reprend contact avec lui dans le premier trimestre 2021 pour une réunion de préparation sur place.

Anne-Marie Leprévost (61)



De gauche à droite, Christian, Véronique, Yves et Mickaël à Avranches le 28 02 2020.

Christian LEVESQUE cesse ses cours à Avranches et à Granville.

Notre ami Christian, lors du second confinement, a décidé de mettre fin aux cours d'espéranto qu'il dispensait assidûment et avec générosité depuis plusieurs années. La fatigue des déplacements et un nombre d'élèves en forte diminution l'ont amené à cette conclusion.

Christian a beaucoup donné et nous l'en remercions. Nous nous souviendrons tout particulièrement de la visite touristique de Granville où il brandissait fièrement un grand drapeau à l'étoile verte et dernièrement de l'accueil au sein d'un de ses cours à Avranches de l'espérantiste russe Mikaelo Bronštejn.

Nous remercions également les amis d'Avranches qui ont accompagné le cours de Christian en lui réservant une salle de réunion et en organisant des réunions publiques fort intéressantes avec l'Américain Duncan Charters et le groupe musical « La Kompanoj » qui avait chauffé la salle (puis le restaurant tout proche) avec des chansons de Jacques Brel sur des airs endiablés d'accordéon !

Nous espérons prolonger cette collaboration et trouver d'autres formes d'enseignement de l'espéranto en mobilisant d'autres forces locales avec l'appui de moyens modernes de communication. Anciens élèves de Christian d'Avranches et de Granville, nous sommes à votre disposition !

Merci à toi, Christian, ta collaboration à notre association régionale nous reste précieuse. Nous comptons sur toi !

Yves.

Le 3 Octobre, rendez-vous à la chapelle Saint-Vigor à Saint Martin de Mieux*.

C' est avec plaisir et, sans pluie que nous sommes arrivés sur les lieux de notre 1ère visite. Une boisson chaude, un jus de fruits, un gâteau, l' accueil offert par le club Hérouville-Espéranto, put se faire sur des tables dehors bien qu' une solution de repli à l' abri nous ait été gentiment proposée par Madame Debons,



Présidente de l' Association « Les Amis de la Chapelle ».

Après l' annulation de l' A.G à Avranches et le 1er confinement, les participant e s étaient heureux de se retrouver.

À 10h, M. Goyer, conférencier-historien, commence la visite de la Chapelle aux pommiers, une véritable œuvre d' art restaurée et décorée par l' artiste japonais Kyoji Tabuko bien connu au Japon .

La conférence débute dehors par l' histoire, les différentes étapes de la rénovation..Nous pouvons admirer « le miroir d' eau » où se reflètent, le clocher, les murs et les toits de

tuiles colorées.

Nous entrons dans la chapelle en passant devant le vénérable et magnifique if qui garde la porte d' entrée.

L' artiste nippon a commencé les travaux en 1992 avec l' aide de la mairie, de l' association et de fonds collectés auprès de mécènes français et surtout japonais. La chapelle doit son nom à la décoration du peintre : branches, feuilles, fleurs et fruits du pommier en toute saison, en hommage à la Normandie, adoptée par l' artiste puisqu' il a vécu à Falaise avec sa famille pendant 10 ans le temps de la restauration.

Dans la chapelle, les charpentes et les tuiles de verre émaillé, colorées aux couleurs de l' arc-en-ciel laissent pénétrer la lumière renvoyée par le sol en acier ; sur les murs des feuilles de plomb sur lesquelles ont été apposées une trentaine de couches de peinture de couleur, une dernière couche blanche, un dessin au fusain et les gravures.

Après la visite très intéressante, vivante, enrichissante, nous ne manquerons pas de faire connaître ce lieu à nos ami e s espérantistes et en particulier aux japonais es *voir le bulletin n° 278 de septembre 2020

Michèle LANGEAIS (14)



EN LA KASTELO. Raporto de Bertrand.

Post la tagmanĝo, la grupo dividiĝis. Iuj promenis kaj piede malkovris la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn. Aliaj preferis viziti la muzeon de la aŭtomatoj aŭ la kastelon de Vilhelmo. Ĉar mi neniam ankoraŭ vizitis ĝin, mi do elektis tiun proponon.

Preskaŭ nenio restas el la unua kastelo, probable konstruita en la 10a jarcento, tiel malnova do kiel Normandio mem. La kastelo ne plu aspektas kiel ĝi estis kiam Vilhelmo naskiĝis ĉi-tie en 1027 aŭ 1028.

El la tri ĉefturoj hodiaŭ videblaj, unu, la granda ĉefturo, estis konstruita en 1123 de Henri la unua de Beauclerc, laŭ la modelo de la Turo de Londono, la alia, la malgranda ĉefturo, de Henri la dua Plantagenêt kaj la lasta, la Talbot-Turo, de la reĝo de Francio Philippe-Auguste, komence de la 13-a jarcento.

La plej interesa parto de la vizito certe estas tiu de la granda ĉefturoj precipe de la unua etaĝo kiu estis la loĝejo de la normandaj dukoj, la granda aŭlo kiel festoĉambrego, la

dormoĉambro de la duko kaj la privata kapelo. Estas ankaŭ spuroj de kuirejo kaj manĝaĵa rezervejo. Tiu ĉefturo staras sur pli malnovaj fundamentoj kiuj ekzitis kiam naskiĝis Vilhelmo la Konkeranto.

Dum la tuta vizito, historiaj personoj, Vilhelmo, Leonkora Rikardo, Eleonoro de Akvitanio rakontis al ni sian vivon kaj igis nin malkovri la sekretojn de la historio de la kastelo per mallongaj filmoj. Per tabulkomputiloj, ni malkovris la internon de la kastelo, kun ĝiaj koloroj, ĝiaj mebloj. La virtuala realo klarigis al ni kiel oni vivis ĉi tie dum Mezepoko.

Elirinte, ni ankaŭ interesiĝis pri la malgranda ĝardeno kie oni vidas plantojn klasifikitaj laŭ sia utileco.

Ve, ni ne havis sufiĉe da tempo por iri al la fonto kie Roberto la belega kaj Arlette, gepatroj de Vilhelmo, renkontiĝis. Ne gravas : ne plus estas tie nek belegaj virinoj nek ĉarmaj dukoj !

Bertrand Verstraete (14)



EN LA KASTELO. Raporto de Patrice.

Malgraŭ la pesimistaj prognozoj far Méteo-France, la vetero estis milda por nia vizito de la urbo Falaise. Nia grupo dividiĝis en tri grupojn, kaj la ni eksturmus la kastelon.

Masiva kaj monumenta kastelo, sur roka monteto. La aliro surprizis nin, ĉar, kvankam ni antaŭsupozis mezepokan konstruaĵon, ĝia enirejo estas renovigita kaj, anstataŭ ŝtonon, oni uzis vaksitan betonon. Ankaŭ estas ŝtalaj piedvojoj, vitraj plankoj kaj pendigitaj koridoroj.

Jarmila historio miksiĝas kun la nuna tempo : dank'al modernaj teknikoj kiel tiuj videoprojekcioj kiuj, dum nia paŝado, subite surscenigas sur la muroj, tiun aŭ aliajn el la tiamaĵ herojoj. Tiuj filmetoj kun aktoroj bele vestitaj kaj en homgranda formato faciligas kompreni la kuntekston. Plie platkomputilo je la dispono de ĉiu vizitanto surekrane montras meblita la vizitatan ĉambron kiu en realo estas senigita de siaj ornamaĵoj. Kia surprizo vidi virtualan fajron brulantan en la kameno kiu staras antaŭ niaj okuloj, kaj malkovri helkolorajn kurtenojnde la tiama epoko.


Necesas bonaj kruroj por supreniri kaj malsupreniri la diversajn nivelojn.

Pro la Kronviruso, iuj enirejoj estis fermitaj, tial ni ne povis aliri la ĉefturon de kie – laŭdire – la vido super la ĉirkaŭa kamparo estas belega, kiel ni vidas jam de la pli malaltaj niveloj. La historiaj klarigoj estas multnombraj kaj precizaj kaj allogus la ŝatantojn de la mezepoko pasigi tie horojn.

Rakontoj pri amo, malamo, perfidoj, potenco, militoj. La historio de la homaro resumiĝas inter tiuj malnovaj ŝtonoj.

Bonŝance, por repacigi nin kun la homaro, iom da mildeco kaj espero fine de la vizito : ĝardeno kun ĉiaj medicinaj plantoj, por resanigi la feliĉulojn, kiuj postvivis la militojn !

Patrice Dufeu (76)



kikero



Balade pédestre autour de Falaise

Guidés par Yves, 12 randonneurs quittent le restaurant « les Remparts » et se dirigent vers le pied des murailles du château pour admirer la tour Talbot (gouverneur de Falaise, 1449), le donjon ducal le plus ancien et l'autre donjon destiné aux invités. Profitant du site et du soleil, le groupe pause pour une photo !

En descendant vers « la Fontaine d'Arlette », nous longeons le roc sur lequel est construit le château-forteresse. Bref arrêt pour prendre connaissance de la légende de la rencontre entre les futurs parents de Guillaume. Puis, le chemin serpente « hors les murs » dans le quartier nommé « Val d'Ante » avant d'atteindre un étang (site splendide).

La montée vers la « Porte de Caen » nous laisse à penser qu'elle devait être très visible des défenseurs de la forteresse. Après l'avenue d'Hastings, formant une « digue » élevée, nous plongeons dans une seconde partie du « Val d'Ante » avec des potagers en terrasse puis remontons très fort vers l'église St-Laurent (XIIème et XVIème siècles) et son cimetière, avec point de vue sur la pointe Nord-Ouest de la ville de Falaise. La rue, pour atteindre les vestiges d'une « porte de ville », est très montante et bordée d'îlots de la

Reconstruction et d'autres bâtiments plus anciens. Nous remarquons dans la rue aux Juifs une maison à colombages avant d'arriver par une pente douce à l'église St-Gervais-St-Protais (XIème-XIIème et XXème siècles). On y était baptisé par immersion complète avant l'installation d'un baptistère. Une maquette du quartier détruit en août 1944 rappelle les terribles combats de rue entre des nazis et des anglo-canadiens.

Nous dirigeant vers le château, nous traversons un quartier entièrement reconstruit avec sa place du marché récemment rénovée, puis atteignons la place Guillaume-le-Conquérant où l'illustre Duc parade en majesté sur une fameuse statue équestre. Tout à côté, l'église de la Sainte-Trinité, l'Hôtel de ville, le mémorial des civils dans la guerre (malheureusement fermé lors de notre visite).

Voilà une bien agréable promenade en si amicale compagnie et sous un ciel clément, à peine troublé par une fine pluie alors que nous remontions dans les voitures.

Zef, Jean-Pierre Leprévost et Anne Marie Leprévost (61)



NI VIZITIS LA MUZEON PRI AUTOMATOJ



La vizito okazis en tri etapoj :

- Filma enkonduko prezentas la historion de la animigitaj montrofenestroj
- Enscenigita ateliero montras la faradon de la mekanizitaj ŝajnteatropupoj
- Eksmodaj stratoj kun montrofenestroj invitas al retrospektivo de tiu pasintjarcenta varbilo pere de ekzotik-, kristnask- aŭ vintraj scenoj.

Ĉefas en tiu muzeo la prezento de la kolekto Decamps de la dudekaj ĝis la kvindekaj jaroj. Miriga estas la partopreno de famaj desegnistoj (Dubout, Peynet) por personigi la aŭtomatojn.

Plaĉis al mi la historio pri la unua animigita montrofenestro en la granda magazeno « Au bon marché » : komence de

la dudekaj jarcento Peary atingis la Nordan Poluson. La evento furoregis kaj vekis interesecon. Tiel la ĉi-supra fama magazineno dediĉis montrofenestron al tiu bravegaĵo... De tiam disvastiĝis la vintra rendezvuo por infanoj ĉe fasadoj de la famaj ĉiovendejoj.

Sylvie Caron (76)

STAĜO EN LA KASTELO GREZILJONO

Marie-Anne kaj Claude estas fidelaj partoprenantoj de la kursoj en Hérouvill-Saint-Clair kaj, kiam la klubo ferias, ili ofte partoprenas E-o aranĝojn en Francio kaj eksterlande. En 2020, ili partoprenis la staĝon en Les Issambres kaj alian en Kvinpetalo (Bouresse). jen ilia raporto pri tria rendezvuo en la fama Kastelo Greziljono en Baugé (Maine-et-Loire) :

Antaŭ la dua izoligo, Marie-Anne kaj mi partoprenis esperantan staĝon en Greziljono. Pro la kronvira pandemio, la staĝo akceptis nur dek kvin samideanojn el Francio ; la eksterlandanoj kiuj sin anoncis kompreneble ne povis vojaĝi.

La programo estis riĉa : ĝardenumado kun Nathalie, kantado kun la fama grupo « Interkant » aŭ diversaj ekskursoj, sed ni elektis la paroligan kurson de Elisabeth Ledru. Ŝi estas tre sperta instruistino kaj ni multe prilaboris la lingvon per ludoj, teatrumado, gramatikaj klarigoj kaj aliaj kaptoplenaj ekzercoj.

Bonŝance la vetero estis agrabla kaj ebligis belajn promenadojn kaj viziton de du belegaj kasteloj en Baugé kaj Gizeux, bieno de la familio Du Bellay.

Ni pasigis tre interesan kaj fruktoplenan semajnon kaj rekomendas al ĉiuj ĝui la buntajn programojn de la Kastelo Greziljono.

Marie-Anne Piette, Claude Ferrand (14)

Le stage intensif du printemps 2021 à la Maison Culturelle de l'Espéranto (Baugé), du 16 au 24 avril, vous permettra de progresser dans les niveaux A1-A2, B1, B2, C1 avec des professeurs de renom : Przemek Wierbowski, Szilva Szabolcs, Christophe Chazarein et Marion Quenut. Et, si vous le souhaitez, vous pourrez passer l'examen international, les 23 et 24 avril.

Information : « gresillon.org » / 02 41 89 10 34



Le Gvidilo nouveau est arrivé

Nous avons rénové la présentation du guide « Turismo kaj Esperanto » que nous gérons depuis une dizaine d'années. Pour rappel, son adresse internet : <http://www.gvidilo.net> .

Plus de 100 000 visiteurs déjà. Mais tout cela coûte très cher et notre groupe est trop modeste. Nos cotisations annuelles payent à peine les frais de tenue de compte de la Banque Postale.

Nous ne souhaitons pas la disparition de ce site qui représente des heures de travail et un intérêt certain compte tenu du nombre de visiteurs. Pour cela, nous lançons une souscription pour le sauver. Les petits ruisseaux faisant les grandes rivières, même les petits dons sont les bienvenus.

Soit par virement à la Banque postale :

Havra Esperantista Grupo, compte n° 01254 85 A 035 ROUEN.

Soit en chèque à l'ordre de Havra Esperantista Grupo – Adresse : Havra Esperantista Grupo, chez Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier, 76600 Le Havre.

Bernard Dufresne pour le groupe du Havre.

NI PARTOPRENIS LA UNIVERSALAN KONGRESON !

Pro la pandemio, la UK-o antaŭvidita en Kebekio estis nuligita sed UEA ne rezignis kaj proponis retan kongreson kun bunta kaj tre interesa programo. Ĝi estis senpaga kaj tutmonde malfermita. Multaj homoj kiuj ordinare ne povas partopreni Universalan Kongreson pro laboro, familiaj devoj, sano, aŭ monrimeda manko, tiun fojon povis de sia hejmo ĉeesti tiun gravan rendevuon.

Ni povas dedukti, ke el grava problemo naskiĝis esplorindaj perspektivoj dank'al novaj komunikiloj kiel « Zoom », « Jitsi » ! Tre certe, tiaj rendevuoj okazos plu, eĉ kiam ni ne plu estos sub la jugo de tiu aĉa kronviruso !

Pluraj samideanoj el Normandio sekvis tiun unuan perretan Universalan Kongreson (aŭ tiun de SAT kiu devus okazi en Pollando) kaj kelkaj eĉ organizis amikan rendevuon por kune spekti ĝin. La afero okazis iun varmegan tagon de aŭgusto ĉe Véronique Bessin kaj Patrick Etienne, apud Julouville. Ĉeestis ankaŭ Annick

Besneville, Christian Levesque kaj Jean-Pierre Danvy (Granville), Jean-Pierre Sauvage kaj Yves Nicolas (Caen). La programero spektita kontentigis ilin kaj estis ankaŭ preteksto al interŝanĝoj pri diversaj aspektoj de nia lingvo/movado kun multaj anekdotoj de Jean-Pierre Danvy. Bela domo, multplada manĝado kaj bongustaj vinoj ankaŭ kontribuis al tiu amika rendevuo.



Malgraŭ la izoligo, Hérouville Esperanto ĉiun semajnon rendevuas !

Nia klubo deĵoris, kiel kutime, la Feston de la asocioj en Hérouville-Saint-Clair kaj ekde la 29a de septembro proponis novan kursan sezonon kun respekto de la kontraŭpandemiaj reguloj (surmeto de masko kaj purigado de la manoj). Bedaŭrinde, post du-tri mardoj, nova izoligo estis starigita kun malpermeso fizike renkontiĝi.

Sed Hérouville-Esperanto ne rezignis kaj tuj proponis retan rendevuon, ĉiun mardon vespere. Pluraj prelegetoj jam okazis : Dominik pri insulo Maŭricio, Gérard pri veturilo* por irigi handikapulojn laŭ forte deklivaj padoj en Alparo, Jean-Pierre pri renkontiĝo kun rusaj esperantistoj en Sankta-Peterburgo. Iom pli ol 10 klubanoj ĉeestas kaj eventuale metas demandojn pri la pritraktata temo aŭ alportas novaĵojn. Tia aranĝo kompreneble estas malpli alloga ol ordinara kunveno en nia klubejo sed havas sian rolon en la plua vivo de nia asocio.

Por decembro, estis programitaj : interŝanĝo kun Cirilo kaj Roz' pri ĉirkaŭmondaj bicikladoj, partopreno al la Zoom Poliglota Rendevuo de Hérouville kun partopreno de esperantistoj el Tiĥvino, kaj luda promenado en nia urbaro per misteraj fotoj. Kaj se bezone, ne mankos aliaj retaj rendevuoj en januaro 2021 !

La kronviruso ne mutigos nin !

Artikolo redaktita fine de novembro.

* La Joëlette



EN ESPERANTUJO, ONI SURMETAS ŜIKAJN MASKOJN !

Por promenadi, oni postulis de ni surmeti maskon. Ĝenerale blua aŭ blanka paperaĉo nebuligante la okulvitrojn aŭ rifuzante kaŝi la nazon, ĝi tro ofte donis al la marŝantoj tristan mienon kvazaŭ ili senkonscie atendis liron en la plej proksima hospitalo !

Slovaka asocio « E@I » (Edukado ĉe Interreto. Multaj informoj en ĝia retpaĝo ĉe Vikipedio), kun juna kaj vigla dungitaro, tre aktiva en Esperantujo kiel organizanto de multhomaj e-o renkontiĝoj, havis la bonan ideon vendi elegantajn maskojn kies tuka eksteraĵo diskrete prezentas Esperanto flagetojn.

Estu ŝikaj surstrate, kun verdaj steletoj sur viaj nazo kaj buŝo !

Vizitu la interesan katalogon de «E@I» :

« espero.sk/eo »



LA NORMANDA DIALEKTO

Miascie, neniam aperis en nia Normanda Esperanto Bulteno, (NEB), artikolo pri la dialekto de nia provinco. Certe ja, de kelkaj jardekoj ĝiaj sonoj tute malaperis el niaj kampoj kaj stratoj, kaj ĝi precipe fariĝis afero de erudiciaj specialistoj.

Malgraŭ tiu retiriĝo de la lingvo el la kuranta loka vivo, ĝia interesega literaturo daŭre estas facile trovebla kaj tute inda je hodiaŭa legado. Do nia normanda bulteno ja povas almenaŭ fojfoje aludi pri ĝi, despli ke kelkaj el ĝiaj ekzempleroj eliras el la provincaj limoj kaj eĉ atingas Japanion !

Mi ne memoras ekzakte kiel mi, "horsain" (1) el Coulommiers, sed fizike kaj psike normandiĝinta de 45 jaroj, lernis la ekziston de la normanda dialekto kaj de ĝia literaturo, precipe ĝia poezio. Nia samideano, la Patro Marc el Briquebec (50), kiu perfekte posedas ĝin (kune kun la latinan, hebrean, kaj verŝajne multajn aliajn lingvojn), ludis gravan rolon en la afero : li min informis pri la normanda pastro kaj poeto Côtis Capel, de kiu li min donacis Ko-diskon kun la skribitajn tekstojn. Poste mi malkovris la ekziston de la normandaj aŭtoroj Louis Beuve kaj JB Pasturel, ankaŭ tre interesaj. Ĉiuj estas troveblaj en interreto.

Ĉi sube mi prezentos specimene, la unuan el naŭ dekversaĵoj de poemo de Pasturel, nomita

"Dauns le grényi" (En la grenejo)


Eunn' nyit qu' les rats, ao-d'ssus d'ma tête,
Avaient m'né l'sabbat sus l'pllaunchi,
L' lend'main j' fus vei c'qué ces sal's bêtes
Avaient co pu m'endoumagi.
J'trouvis sortaut d'eunn' pouqu' perchie,
Eun miot partouot éparpillie,
La sumench' dé mes poum's dé terre ;
Et ch' est voulaunt la rassembli
Qu' dauns eun coin, j'avisis l'vuus ber
Qu'était lo, muchi dauns l' grényi.

Une nuit qu' les rats
au d' ssus ma tête
Avaient mené l'
sabbat su l'
plancher,
L' lendemain j' fus
voir c' que ces sales bêtes
Avaient encore pu m'endommager.
J' trouvai sortant d'un sac percé,
Un peu partout éparpillée,
La semence de mes pommes de terre ;
Et c'est en voulant la rassembler
Que dans un coin j'aperçus le vieux berceau
Qu'était là, caché dans l' grenier.



lun nokton ratarmeoj sur la plankajo de la grenejo

Superantaj mian dormejon, estis brue sabatigintaj.
Kiam finfine mateniĝis, mi iros vidi kion ĉi bestaro
Plian fojon el miaj aĵoj, ja povis esti damaĝintaj.
Truitan mi trovis la sakon de miaj plantotaj terpomoj,
Ĉiuloken disĵetitaj ; kaj dum mi ilin rekunigis,
Mi ekvidis oldan lulilon kiu atendis jam de jardekoj,
Tie kaŝitan en la grenejo.



Cimetière Clémenceau
Caen. Tombe de Charles
Lemaître, poète normand.

En la sekvo, la poeto tre emociige imagas la travivaĵojn de tiu vimenlulilo, ĝia naskiĝo en la vimenejoj de la marĉoj de Mesnil Angot kaj Remilly (50), la ĝojoj kaj timoj de du junaj gepatroj en ĝi flegantaj sian bebon. Se vi volas koni la tuton, vi povas aĉeti la libron de Pasturel, titolitan " HISTOUÈRES DÈ TCHU NOUOS " ĉe la librejo La Mâove, 33 rue Gambetta, 50 200 – Coutances. En tiu libro troviĝas ankaŭ 33 aliaj poemoj, same interesaj.

Mi esperas ke niaj samideanoj de la departemento Manche aldonos, kritikos, precizigos, ..

Henri ROUSSEAU (14)

(1) Horsain : normanda vorto, ankoraŭ nun tre uzita en Normandio, kiu signifas "ne normando". Kiel ĝin traduki en esperanto ? Eksterulo ? Horsina, horsinulo (ĉar naskiĝinta ekster la normanda sino) ?

VIDPUNKTO

Anarkiismo kaj Esperanto

Sen ia dubo, Zamenhof ne estis anarkiisto. Tamen, liaj lingva kaj homarana proponoj, kiuj emas transiri ne nur la landajn limojn sed ankaŭ la intelektajn, en tiu senco havas rilaton kun la celoj kaj deziroj de la anarkiistoj.

Kvankam la moderna vivo fariĝis tutmonda, la tempo uzata en tradukado restas problemo. La uzo de internacia lingvo estas solvo pli facile atingebla kaj logika ol akirado de duona dekduo da naciaj idiomoj

Inter la organizitaj anarkiistoj de la komenco ĝis nun estas adeptoj de Esperanto, kiuj vidas en tiu lingvo ilon por pasi de idealo al realo kaj solvi la lingvan problemon inter anarkiistoj el la tuta mondo.



nuna anarkiista sindikato en Hispanio

Eduardo Vivancos

Inter la anarkiistoj kiuj pledis por la uzo de Esperanto, ni elektis la aŭtoron de broŝuro "Unu lingvo por ĉiuj : Esperanto". Eduardo Vivancos naskiĝis en Barcelono en 1920 kaj partoprenis la hispanan militon en la "kolono Durruti". Sian tutan vivon li restis membro de la anarkiista sindikato "Conferación Nacional del Trabajo" (CNT) kiu tre grave rolis dum la hispana respubliko. En Hispanio kaj poste en Francio kaj en Kanado, li restis tre aktiva esperantisto, ekzemple kiel redaktanto de "Senŝtatano", organo de la postmilita

"Junul-Anarkista Internacio"



Eduardo Vivancos en 2017

kaj organizanto de la unua ekstereŭropa kongreso de SAT (1973) en Kanado, kie li vivas plu.

"Paco-Libereco"

Kvankam malrapide, esperanto penetris en la laboristajn kaj revoluciajn mediojn. La anarkiistoj, en la komenco de la diskonigo de esperanto, estis ĉe la avangardo de la laborista esperantista movado. En 1905 formiĝis en Stokolmo la unua anarkiista-esperantista grupo kaj en 1906 konstruiĝis en Parizo la grupo

"Paco-Libereco" (kiu evoluis al "Liberiga Stelo") kies influo grave rolis en la ĝenerala esperantista movado.

Lanti

"Liberiga Stelo" tiam eldonis revuon "Le travailleur espérantiste" kies redaktoro estis Lanti. Liaj artikoloj, sub la nomo « Sennaciulo » forte kontribuis al la kreo de SAT en 1921 en Prago. Lanti konfesis sian vidpunkton libroforme en 1922. La titolo de la libro, "For neŭtralismo" baldaŭ famis en la laborista e-o medio kaj kreis rompon kun la tiama UEA.

Lanti (1879-1947) junaĝe rilatis kun Sébastien Faure kaj Jean Grave kaj portempe aktivis en la anarkiista movado.

Dum la unua mondmilito, li lernis esperanton kaj vidis ĝin potenciale forta por batali kontraŭ patriotismo. La filozofio de Lanti baziĝas sur "sennaciismo" kiun li oponas al "internaciismo". Por Lanti, "internaciismo" signifas nur internaciajn rilatojn kaj ne entenas revolucion ideon. Male, "sennaciismo" radikale luktas kontraŭ naciismo.



Christian Levesque (50)

BIOGRAFIO :

Pri Eduardo Vivancos

-Volonte anarchiste : Une langue pour tous : l'Espéranto. Eduardo Vivancos. Editions du Groupe Fresne Antony de la Fédération Anarchiste

*Aperis en « Belettra Almanako » n-ro 33 (oktobro 2018) lia tre leginda« Notoj el mia taglibro (1937-1938) » kiun esperantigis lia fratino Juliette Ternant (ndlr)

-« Eduardo Vivancos » en Vikipedio

Pri Lanti

- Vivo de Lanti. E. Borsboom. S.A.T.

- Artikolo de Pastro Mark, en la Normanda Bulteno n° 261 de 2015

Une nouvelle page d'histoire LA RUE ZAMENHOF à SOTTEVILLE-LES-ROUEN

Le blog « Sotteville au fil du temps »*, qui entretient la mémoire de Sotteville-lès-Rouen, a récemment accueilli un article richement illustré, proposé par notre ami Pierre Lemarchand et intitulé « L'espéranto et la rue Zamenhof à Sotteville ». En voici de larges extraits et quelques illustrations.

La fin du XIX^{ème} siècle marque à Sotteville le développement des idées réformistes, socialistes et mutualistes. Faciliter l'accès à la culture à tous est une priorité. Dans le même temps, Louis-Lazare Zamenhof (Ludwik Lejzer Zamenhof, en polonais) publie en 1887 le projet d'une langue internationale et simple :

« L'Espéranto ». La langue a connu un engouement international dès les premières années. Sotteville croit à ce projet pacifiste soutenu par la municipalité (le maire était Eugène Tilloy). Des intellectuels et cheminots éclairés pensaient que cette langue fédératrice pouvait éviter la guerre qu'ils sentaient arriver.

C'est ainsi que le 24 mai 1914 le groupe « Esperanta Stelo » de Sotteville accueille avec une grande attention le 7^{ème} Congrès des Groupes Espérantistes de Normandie. A cette occasion, la rue Zamenhof est inaugurée en grande pompe. Ce fut une véritable fête populaire comme en témoignent la photo de l'inauguration de la rue et les différents autres documents.



Puis, Petro apporte des précisions sur le groupe de Sotteville représenté par cette carte postale envoyée le 15 août 1910 au secrétaire du groupe du Havre.

Raoul Cayeux était instituteur à l'école Raspail et avait fondé le groupe en novembre 1905. Il proposait des cours du soir d'Espéranto et de la sténographie «Duployé ». Quand il fut muté à Rouen, Jean-Baptiste Robin prit la

présidence du groupe et assura la poursuite des cours. Mr Lecourt, directeur du Journal de Sotteville, en était le vice-président. Les réunions avaient lieu à la mairie de Sotteville et le groupe recevait une subvention annuelle de la municipalité. Il comptait environ une soixante de membres en 1912 et une centaine en 1914, dont de nombreux cheminots.

Dès l'arrivée des troupes britanniques à Rouen pour la Première Guerre Mondiale, des contacts et réunions régulières, et jusqu'en 1918, eurent lieu à Sotteville avec des soldats du contingent venus de l'empire britannique.

L'association n'a pas survécu au désastre de la Seconde Guerre Mondiale.

Pour ne pas oublier cette époque, une nouvelle résidence livrée en 2005 a été nommée « Villa Espéranto ».

Outre la rue Zamenhof de Sotteville, nous trouvons en Normandie une rue Zamenhof au Havre (1958), une rue Espéranto à Evreux (1959), une rue Zamenhof à Yvetot (1972) et un square de l'Espéranto à Hérouville-Saint-Clair (2014)**.



Pierre Lemarchand (76)

*<https://sottevilleaufildutemps.fr/2020/07/29/les-peranto-et-la-rue-zamenhof-a-sotteville>

**sans oublier le chalet « Espéranto » à Saint-Pair-sur-Mer, près de Granville datant d'avant 1908 (lire le Bulletin Normand d'octobre 2018)



C'est bien joli d'apprendre l'espéranto, mais pour quoi faire ?

La question pourrait raisonnablement se poser en ces périodes de confinement à répétition et de frontières plus ou moins fermées. Plus moyen de rendre visite à des amis à l'autre bout du monde ou de les recevoir à la maison. Alors, l'espéranto, je vous demande un peu, pour quoi faire ? Voici quelques réponses.

Internet se rit des frontières et les sites en espéranto abondent !

Eventa Servo : agenda de nombreux rendez-vous sur la toile : exposés, congrès virtuels, jeux, cours, formations. Quelle variété !

Innombrables pages **Facebook**

Libera Folio (gratuit) et **La ondo de Esperanto** (abonnement) informent très régulièrement sur le mouvement espérantiste

Muzaiko, **Kern.punkto**, **Esperanta retradio** sont des sites culturels très intéressants

De nombreuses radios émettent en espéranto

Wikipedio (la version espéranto de Wikipedia) est d'une richesse incroyable et chacun peut y devenir rédacteur

Sous la couette, lisez des romans, écoutez de la musique

Commandez des livres auprès de **Espéranto France** ou de **SAT-Amikaro** et des CD de nombreux groupes musicaux auprès de **Vinilkosmo**

Abonnez-vous à « Monato », « La Kancerkliniko », « Beletro Almanako », « Literatura Foiro », ...

Adhérez aux associations nationales et internationales


Espéranto-France et UEA (Universala Esperanto Asocio), Sat-Amikaro (Union des travailleurs espérantistes de langue française) et SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)

ET PUIS ! Après la pluie, viens le beau temps !

Nous sortirons bien un jour de cette pandémie ! Préparons dès maintenant nos futurs voyages et nos contacts avec des espérantistes du monde entier : en suivant des cours (par exemple par « **ikurso** ») et en nous inscrivant dans « **Pasporta Servo** ».

**ET EN JANVIER ? Ah ! Oui ! JE REGLE MON ABONNEMENT
AU BULLETIN NORMAND D'ESPERANTO !**

(voir en page 1)



Zoom du 9 décembre 2020
dans le cadre du **Café Polyglotte** d'Hérouville-Saint-Clair (parmi les 42 participants aux différents rendez-vous linguistiques, 12 étaient espérantistes) ; il a été question du jumelage et des échanges entre le club d'Hérouville-Espéranto et le club espérantiste de la ville russe de Tihkvine avec Mikaelo Bronštejn, Sacha Belov et Sacha Kogan (Danemark).